

幻住庵記 (『猿蓑』[1691年]所収本)

RAPORTO EL LA ERMITEJO DE FANTAZIA LOĜADO

[El la libro “Simia Pluvmantelo”]

En la profundo de Isiyama, malantaŭ la templo Iwama, staras la monto, nomata Kokubu-yama. La nomo devenas de la templo Kokubunzi, kiu situis tie en malnova tempo. Travaginte la rojon ĉe la mondpiedo, suprenirinte je ducent paŝoj laŭ tri kurbaj padoj al la oka stadio de monto, oni atingas la ŝintoisman sanktejon Hatimanguu. Tie estas apoteozita la budhisma statuo de Amitabo. Kvankam la pura ŝintoismo tre abomenas tion, tamen ankaŭ admirinde estas, ke du religioj kune favoras polvan mondon, ambaŭ radiante mildan lumon.

Kutime oni ne venas adorviziti ĉi tien, tial estas tre diece kaj trankvile. Apude staras la forlasita kabano. Ĉirkaŭas ĝin artemizoj kaj etbambuoj-sasaoj, tra la tegmento likas pluvo kaj la muroj estas defektitaj, tie loĝaĉas vulpoj kaj nikttereŭtoj. La kabano nomiĝas la ermitejo de fantazia loĝado. Ĝin posedis la bonzo, kiu estis la onklo de la fama bravulo - Suganuma Kyokusui. Post lia morto jam pasis ĉirkaŭ ok jaroj kaj nun ĝuste li restigis nur la nomon kiel “fantazie loĝinta oldulo”.

Mi ankaŭ forlasis la urban vivon antaŭ dek jaroj kaj nun jam havas proksime kvindek jaraĝojn. Kvazaŭ saklarvo, perdinta sakon, aŭ heliko, forlasinta domon, mi ekveturis al la nordaj provincoj Oou, sunbruniĝis sub la varmega suno en Kisagata, vundis al mi kalkanojn laŭ nepiedirebla duno kaj laŭ norda marbordo kun sovaĝaj rifoj, kaj nun ĉi-jare drivas laŭ ondoj de lago Biwa. Kiel la grebo sopiras je la kano por sia flosanta nesto kontraŭ la akvofluo, tiel mi restaŭris la ermitejon, reteginte antaŭtegmenton kaj stariginte plektobarilon, ekloĝis en la monto ekde la komenco de kvara monato nur provizore, tamen mi ege ŝatas ĉi tie, nun eĉ pensas, ke mi ne eliru plu.

La printempo trapasis antaŭ nelonge, ankoraŭ restas floroj de rododendro, je pino rampas monta visterio, kaj ofte traflugadas kukoloj, eĉ krias garoloj, kaj mi ne ĝenas, se pego bekas kabanon, tiel do min tre interesas ĉio. Ŝajnas al mi, ke mia animo kurus fore al la poezia mondo de Dufu, t. e. la orient-suda Ĉinio, al Wu, al Chu, ke mia korpo starus ĉe la bordoj de la riveroj Xiao kaj Xiang, ĉe la bordo de la lago Dongting. Monto staras okcidente-sude, homaj domoj situas bone for de ĉi-tie. Vento de suda montpinto portas suben bonodoron, kaj norda vento de sur la lago estas frista. Jen videblas la monto de Hie, la alta montpinto de Hira, la pinarboj en Karasaki tra nebuleto, la kastelo, la ponto, la hokfiŝaj boatoj, jen aŭdeblas voĉoj de hakistoj, irantaj al la monto Kasatori, kantoj rizprikladaj en la malgranda montpieda kampo, kraka pepado de akvoraloj en la krepuska vespera ĉielo, kiam flugadas lampiroj, - ĉi tie ne mankas la beleco. Precipe la

monto Minakami ja similas al la monto Huzi, memorigas al mi malnovan loĝejon en Musasino, kaj la monto Tanokami igas min sopiri je antikvaj eminentuloj, tie enterigitaj. Estas ankaŭ la montoj, nomataj “Sasahogatake”, “Senzyougamine” kaj “Hakamagosi”. La vilaĝo Kurozu estas tre plena de nigraj arbaroj kaj konservas ankoraŭ la pejzaĝon, versitan en la poemaro de Man’joa epoko kiel sunbruna fiŝkaptisto ĉe naso.

Dezirante spekti pli vastan panoramon, mi grimpas al la supro de malantaŭa monto, tie faras el pinbranĉoj seĝon kun paila kuseno, kaj nomis ĝin “simia seĝo”. Sed mi ne estas tia, kia estis Xuquan, nestinta sur la frukta maluso, aŭ Wangwen, stariginta ermitejon sur la supro de monto Zhubu, kiel versis ĉina poeto Huan Shangu. Mi fariĝas nur la dormema montano, kaj relasas krurojn sur la kruta montpinto, kaj sidas en senhoma monto, deprenante pedikojn.

Kiam mi hazarde estas diligenta, mi ĉerpas puran akvon el valo kaj mem kuiras. Sopirante je gutoj, nomataj de Saigyoo “Toku-toku”, tre facile mi preparas kuiradon per simpla fajro. Antaŭa loĝinto ĉi tie vivis kun tre alta koro, tial do restas neniam artefarita superfluaĵo. Estas nur aparta ĉambro por budhana altaro kaj estas ejo por nokta kuseno kaj kovriloj.

Interalie la ĉefbonzo de monto Koura en Tukusi, la filo de ŝintoisto, nomata Kai de la sanktejo Kamo, alvenis al Kioto ĉi foje, tiam mi petis lin pere de iu homo skribi nomplaton por mia ermitejo. Li tuj volonte prenis tuĉpenikon kaj skribis al mi tri hieroglifajn literojn: “Gen-zyuu-an” [t. e. la ermitejo de fantazia loĝado]. Mi faris ĝin la memoraĵo de mia herba kabano. Jen en monta loĝejo, jen sur vojaĝa kuŝejo, mi havas nenion por rezervi. Tiel do mi pendigis nur kameciparisan ĉapelon de Kiso kaj kareksan pluvmantelon de Kosi sur la pilastro ĉe kapkuŝeno.

Dum tagoj mia koro movetiĝas je rare vizitantoj. Kaj maljuna gardisto de la sanktejo kaj vilaĝanoj, alvenante al mi, paroladas, ke aproj formangas rizojn, aŭ ke leporoj venas al legumena kampo, babiladas pri agrikulturo, kion mi ne scias. Kiam la suno jam tuŝas montokreston, mi sidas kviete kaj atendas lunon, kaj mi faras mian ombron akompananto, aŭ metinte lumon, mi filozofas ĉirkaŭ duonombro pri la leĝo de kaŭzeco, esti aŭ ne esti.

Kvankam mi diras tiel, tamen tio ne signifas, ke mi fervore ŝatus kvietecon kaj volus kaŝiĝi en monto aŭ kampo. Mi estas simila al la homo, kiu, laciĝinte iomete pro malsano kaj pro homarilato, rezignis la mondon. Se mi ja rememoras miajn pekojn dum pasintaj jaroj, iam mi enviis postenon de oficisto, iam volis eniri en la budhisman pordon, tamen, turmentante mian korpon sub necertaj ventoj kaj nuboj, adorante florojn kaj birdojn, mi portempe pasigis mian vivon per tiu tasko, finfine mi atingis ĉi tiun vojon, kvankam mi ne havas talenton, nek kapablon. Pro tio Bai Juyi rompita al si ĉiujn internaĵojn kaj Dufu

maldikiĝis. Je saĝeco kaj malsaĝeco, je kvalito de literaturo, mi ne egalas al ili, sed ĉe ĉiuj loĝado ne estas ne fantazia. Tion fine pensante, mi kuŝis.

Antaŭ ĉio estas io por fidi,
Jen staras arboj de pasanio,
Jen somera arbaro
[Mazu tanomu sii no ki mo ari natu kodati]

幻住庵記 『芭蕉文考』(1801年)所収

[El Basyoo Bunkou (La pensoj pri literaturo de Basyoo)]

En la profundo de Isiyama, malantaŭ la templo Iwama, staras la monto, nomata Kokubu-yama. La nomo devenas de la templo Kokubunzi, kiu situis tie en malnova tempo. Ĉe la montpiedo fluas malvasta rojo kaj estas malvarmete. Poste fendante densaĵon, suprenirante laŭ deklivo kun tri kurboj je ĉ. 150 metroj, oni atingas la sanktejon Hatimanguu. Konstruaĵo estas tre dieca. Apud ĝi troviĝas la forlasita kabano kun putra tegmento kaj kun falintaj muroj. La alero estas kovrita per pinarbo kaj azaleoj, la korto estas fermita per bambetoj-sasaoj, videblas svage nur spuroj de lupoj kaj nikttereŭto. Oni nomas la kabanon Genzyuan [la ermitejo de fantazia loĝado]. Ĝi estas ruino de forlasita ermitejo de la bonzo, la onklo de iu prodo Suganuma Kyokusui. La posedinto jam mortis antaŭ ĉ. ok jaroj, tamen loĝejo restas en ĉi fantazia mondo. Ĝin reparis por mi, ŝtopinte pluvoakvon penetri, rearanĝinte plektbarilon, s-ro Kyokusui, kiu admonis min ne ekveturi for al Sikoku. Lastjare mi sunbruniĝis en Matusima kaj Kisagata, vundiĝis je kalkano sur la raspa marbordo, kaj ĉi jare drivadis ĉe la bordo de lago. Same kiel tempas al grebo, kiam eĉ ĝia flosanta nesto haltas, tiel do, komence de la kvara monato enirinte provizore en tiu ĉi monto, mi ege ŝatis ĉi tie tiom, kiom mi ne volas eliri plu.

Vere belega loko kun pura ombro kaj riĉa verdaĵo. Norde estas lago plena de akvo, kaj ĉirkaŭ la lago troviĝas ĉiuj famaj vidindaĵoj, ekzemple, monto de Hie kaj alta montokresto de Hira. Ne eblas elskribi ĉion por mi, al kiu mankas esprimkapablo de peniko. Nur mi ripozas ĉe la alta pinarbo, lasante krurojn liberaj, kaj sidas fone de blua monto, dispremante pedikojn. Mi ankoraŭ ne ĝissatiĝas elspekti vastan panoramon, kaj grimpas al la supro de malantaŭa monto, tie tranĉis pinbranĉojn, kunligis ilin per visteria grimptigo, sternis pailan kusenon, kaj nomis ĝin “simia seĝo”. Surprize plivastiĝas vidkampo kaj koro, ĉi tie al mi estas pli bele ol la Yueyanglou, de kie Dufu

admiradis naturon tage kaj nokte, kaj mi sentas min kvazaŭ Konfuceo, vastanime rigardanta la landon Lu de sur alta monto, kiel dirite de Mengzi. Mi vidas lontane landlimon de Wakasa, la montaron de Ise, la landon de Mino, kaj vidas, kiel la monto Ibuki subtenas ĉielon. Proksime videblas kvazaŭ en pentraĵo la kastelo de Zeze kaj pinarboj sur la kabo Karasaki. La ponto de Seta, konstruita ĉe la fino de aleo, atendas vesperan ruĝan sunlumon. La monteto Sasahogatake staras sekve de la monteto Tanakami, kaj sude troviĝas la montoj, nomataj Senzyougamine kaj Hakamagosi. Mi aŭdis iam jenan malnovan poezion,

La monto kovrita de neĝo

Similas al trapeza ornamo

De hakamo-jupo de blinda bonzo.

Kvankam en ĝi nenion interesan mi ne vidis antaŭe, tamen nun mi sentas ĝin aprobinda, ke ĝi, probable, estis versita apud ĉi tiu monto. La monto Mikami estas simila al la monto Huzi, do tio ne licas ne memori al mi iaman ermitejon en Musasino. La simia seĝo fariĝis benko por ĝui malvarmeton en tago, sidejo por spekti lunon kaj ripozejo, kiam mi kolektas brullignojn. En valo estas malvarma akvo, elfluanta inter rokoj. En antikva tempo Dio kvazaŭ, kunĵurante, sur ĉi tiu akvo spegulis sin, eĉ dum varmega sekeco ne ĉesas la akvo. Gutoj, falantaj laŭ verdaj filiketoj kaj muskoj, memorigas al mi unu version de Saigyo pri la gutoj “Toku-Toku”, kaj dank’ al la akvo estas tre facile pretigi kuiradon. La ermitejo estis konstruita simple sen iu ajn bagatelaĵo, aparte estas unu ĉambro kun budhana altaro, kaj la provizejo estas dividita nur per ŝoĵio.

Ĉi-foje la ĉefbonzo de monto Koura, fama en la provinco Tūkusi, alvenis al Kioto, tiam mi petis lin pere de iu homo kaligrafi nomplaton por mia ermitejo. Li tuj volonte prenis tuĉpenikon kaj skribis al mi tri hieroglifajn literojn: “Gen-zyuu-an” [t.e. la ermitejo de fantazia loĝado]. Mi skribis mian nomon malantaŭ la nomplato, por ke ĝi fariĝu la memoraĵo por postloĝantoj. Jen en monta loĝejo, jen sur vojaĝa kuŝejo, mi havas nenion altaprezan por rezervi. Tiel do mi pendigis nur kameciparisan ĉapelon de Kiso kaj kareksan pluvmantelon de Kosi sur la pilastro ĉe kapkuŝeno.

Dumtage vilaĝaj maljunuloj kaj gardisto de la sanktejo venadas al mi, helpas min en ĉerpado de akvo aŭ pretigo de teo. Kaj tre malofte estas vizitantoj. Vespere mi sidas kviete kaj ocedas senkaŝe, kaj, metinte lumon, mi faras mian ombron akompananto, kaj mi filozofas ĉirkaŭ kunĉenado de kaŭzeco kaj rezulteco pri tio, ĉu esti aŭ ne esti.

Mi ne aŭdacas ŝati kvietecon, tamen mi nun estas simila al tiu, kiu tediĝis de homoj pro sia malsaneco kaj evitas la mondon. Mi ne scias kial, sed ĝis nun mi travivis, okupiĝante ĝisfunde nek pri budhismo, nek pri monda laboro, nek pri humaneco, nek

pri justeco, sed nur pri unu afero, kiu ege plaĉas al mi de mia juneco kaj longe restas kiel la celo en mia tuta vivo. Ne zorgante pri la ĉiuj aliaj, mi, sentalenta kaj senkapabla, finfine atingis unu ĉi tiu vojon. Ĝenerale poezia estetiko de Saigyoo kaj Sougi, tuĉpentrado de Sessyuu, teceremonio de Rikyuu, kvankam ne egalas je saĝeco kaj malsaĝeco, ĉiuj devas esti trapenetritaj per unuaĵo. Tion pensante, mi masaĝas dorson, frotas ventron kaj tordas vizaĝon, do senscie trapasis tempo kaj jam venis la komenco de aŭtuno meze de julio. Same la tuta vivo devas fini, kiel songo, ankaŭ tio devas esti fantazia loĝado.

Antaŭ ĉio estas io por fidi,
Jen staras arboj de pasanio,
Jen somera arbaro
[Mazu tanomu sii no ki mo ari natu kodati]

Ne aspektas ili,
Ke mortos tuj,
Ĉirpas cikadoj
[Yagate sinu kesiki mo miezu semi no koe]

Tria jaro de Genroku [1690], la tria tagdeko de julio

Basyoo-Tousei